



Universala Esperanto-Asocio (UEA)
Interveno ĉe
Homrajta Konsilio, 13a sesio,
1-26 marto 2010, Unuiĝintaj Nacioj, Ĝenevo.
La 16-an de marto 2010

La lingvaj rajtoj de minoritatoj

Sinjoro Prezidanto, altestimataj gesinjoroj,

Mi reprezentas Universalan Esperanto-Asocion, la tutmondan organizaĵon de Esperanto, la neŭtrala kaj demokrata internacia lingvo, uzata en pli ol cent landoj.

Ni konstatas ĉe UN ke

- Multaj dokumentoj estas je dispono nur en la angla
- La tutmembraj kunsidoj estas interpretataj en la ses oficialaj lingvoj de UN, sed multaj diskutoj en pli malgrandaj laborgrupoj okazas nur en la angla
- La reta videodissendo de la kunsidoj okazas en la originala lingvo de la parolanto kaj en la angla. Kiu komprenas nek unu nek la alian, tiu tute ne povas sekvi la debatojn.
- Iuj laboroj de UN disvolviĝas ne en ses lingvoj, sed nur en du aŭ tri. Ni bedaŭras tion.

Ni forte malaprobas la fakton, ke internacia organizo kiel UN funkcias, ĉiam pli ofte, uzante nur unu solan nacian lingvon.

Jen unu ekzemplo: la retejo de UNIFEM, la UN-organizo por virinoj, estas nur en la angla. Tio estas neakceptebla.

La diverseco de la vivantaj estaĵoj estas valorega kaj devas pluekzisti, same kiel la kultura kaj lingva diverseco. Tiu diverseco videblas en ĉi tiu salono kaj prezentas grandegan riĉecon. Se nacia lingvo fariĝas internacia lingvo, tio estas maljusta kaj maldemokrata. Dum neanglalingvulo serĉas siajn vortojn, anglalingvulo jam serĉas siajn argumentojn. Li ĉiam faras jam la sekvantan paŝon. Dum la anglalingva fakulo esploras pri kemio aŭ fiziko, la neanglalingva fakulo devas studi la anglan por povi eldoni sian verkon en la angla. La anglalingva fakulo probable pli rapide atingos patentojn kaj Nobel Premion. Tiu situacio estas maljusta.

Dum tiu ĉi tago de la 16a de marto temas pri rajtoj de minoritatoj*. Elinter la diversaj popoloj de la mondo, ni menciuj nun francparolantajn afrikanojn; ili sentas sin diskriminaciataj. Ĉu ili baldaŭ iĝos minoritato?

Ni petas, ke UN kaj ĝiaj parencaj establoj kiel eble plej ofte uzu pli ol unu solan lingvon, se eblas la ses oficialajn laborlingvojn de UN. Tio fakte jam estas diskriminacio rilate al la ses mil aliaj lingvoj, kiuj ekzistas en la mondo kaj ne uzatas ĉe UN pro kompreneblaj kialoj.

Cetere, ni dankas kaj gratulas la organizantojn de tiu ĉi sesio pro la ebligo de la interpretado en gestolingvo dum la kunsido de la 5a de marto, pritraktanta la rajtojn de handikapitoj en la mondo.

Fine, ni revenu al la jaro 2008, kiu estis deklarita fare de UN « Jaro de lingvoj »**. UNESCO realigis ĝin. Ni petas UN-n deklari la jardekon 2012-2021 jardeko de lingvoj.

Mi dankas vin pro via atento.

* Déclaration sur les droits des personnes appartenant à des minorités nationales ou ethniques, religieuses et linguistiques, adoptée par l'Assemblée générale, 1992, 47^{ème} session (A/RES/47/135, 18 déc. 1992)
<http://www.un.org/depts/dhl/dhlf/resguidf/resinsfr.htm>

** Assemblée générale, Soixante et unième session, 96^e séance plénière, Mercredi 16 mai 2007, à 15 heures, New York. Résolution adoptée par l'Assemblée générale, 96^e séance plénière, 16 mai 2007, A/RES/61/266, Multilinguisme, point 25. « Proclame 2008 Année internationale des langues » Procès-verbal A/61/PV.96
<http://www.un.org/Depts/dhl/resguide/r61fr.htm>